Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 11-an de majo 2017 per Skype.

Partoprenis:

Amelie Matt en Tromsø
Anne Karin Bondhus en Bryne
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Mario Machlik en Tromsø
Ulf Lunde en Os

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo, la 21-an de aprilo
Aprobita.

2. Ekonomio
La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst 59 906 kr (58 046 kr) Skagen Høyrente 131 107 kr (130 871 kr).

3. Landa kunveno
Malmultaj aliĝintoj ankoraŭ. Ni aperigas memorigilon en Norvega Esperantisto, kaj tiuj, kiuj ne aliĝos antaŭ la 15ª de majo, devos mem zorgi pri sia propra tranoktado.
Se iuj lokaj esperantistoj, kiuj ne partoprenos en la Landa Kunveno, ŝatus partopreni en la festeno sabaton vespere, ni ofertu al ili bileton al nur la festomanĝo kontraŭ 400 kr, do sen kongreskotizo.

4. Eventualaĵoj
La estraro decidis, ke estas en ordo por la kasisto forĵeti malnovajn paperajn kvitancojn kaj fakturojn (pli ol 5-jarajn).

5. Aprobo de la protokolo
La estraro tralegis kaj aprobis tiun ĉi protokolon.

La interkonsiliĝo daŭris de 19.30h ĝis 20.11h.
La venonta interkonsiliĝo okazu post la Landa Kongreso, kun nova estraro.

Raportis Ulf Lunde